

11

ILEKSO

Ilex Aquifolium

 2000?

Kial estas la ilekso tiel pikema? Komprenoble por defendi sin kontraŭ la grandaj herbermanĝantoj en arbaroj kaj herbejoj. Por birdoj tiu akreco ofertas protekton kontraŭ katoj kaj rabobestoj. Ankaŭ la citrona papilio travintras sekure sub ileksaj folioj. Sed ĉu ilekso tiom bongustas? Ŝajne jes por la brutaro: la farmistoj en la pasinteco kutimis nutri per ĝi siajn bestojn - ne ĉiuj folioj estas same pikaj. Homoj frandis la junajn ŝosojn mem en omleto. Ili balais la kamentubon per bukedoj de akraj folioj. Por la merloj, kolomboj kaj turdoj la ruĝaj beroj, kiuj pendas de la inaj arboj, estas vera frandaĵo, kaj tiel disvastiĝas la ilekso. Sed ni, homoj, ne provu manĝi tiujn berojn, ĉar ili baldaŭ vomigos nin, kio en si-mem estas bona afero, ĉar tro multe da beroj mortigus nin. Estas interese, ke en Alzaco oni pretigas kaj trinkas brandon el Ilekso. Cetere la promenbastono de Goethe kaj la sorĉbastono de Harry Potter estis faritaj el ileksa ligno, samkiel la bonkvalitaj blankaj ŝakfiguroj. Kaj *Feliĉa Kristnasko* sen ilekso, la simbolo de senmorteco, estas simple por ni neimagebla.

www.josvertelt.nl



Ook in andere talen



Also in other languages



Ankaŭ en aliaj lingvoj

